


Hodiaŭ ĝi estas nomata "Domo de la verda spaco" (ekspozicioj, prospektoj, konsiloj pri ĝardenumado).

6/Naĝejoj " Nancy Thermal" 1910-1913

Rue du Sergent Bandan

Arkitekto : Louis Lanternier

Ceramikoj : Gentil-Bourdet



La nomo "Nancy-Thermal" devenas de la malkovro de termofonto en 1908, kiam la arkitekto Lanternier boris, 800 m profunde, la grundon.

La termofonto estis inaŭgurita en 1909 dum la internacia ekspozicio.

En 1911, la Nacia Medicina Akademio agnoskis la akvon kiel kuraciva akvo.

En 1913, kuracbanloko estis inaŭgurita.

Aktuale, nur la ronda naĝejo estas provizita de termoakvo.

Kolumnaro kaj blu-verdaj mozaikoj ornamas la internon de la naĝejo, kiu estas kovrita de kupolo.

Tiel greka templo, la konstruaĵo, kie la akvo je 36° ŝprucas, montras skulptaĵon de nimfoj en kongego el porfiro.

7/Rue Félix Faure

Domaro 1900-1909

Arkitekto : César Pain

Realigita de la nancia entreprenisto Lefort, tiu domaro konsistas el vicigitaj, samaltaj domoj, kiuj havas, antaŭe, tre malgandegan ĝardenon.

Oni povas vidi ĉi-tie :

- Domoj laŭ la novarta stilo, verkoj de la arkitektoj de la Nancia Skolo, tiel L. Weissenburger, J. Hornecker ou E. André

- Domoj laŭ normanda inspiro, kies César Pain estas la ĉefa arkitekto.

La precipaj materialoj uzitaj en diversaj fakoj estas :

- la kalka ŝtono "d'Euville", granito kaj muelŝtono, por la tuto aŭ parto de la masonaĵo (soklo, kadro de pordoj aŭ de fenestroj, ornamaĵo...)

- la briko flava aŭ ruĝa por la konstruaĵo (kamenoj, lintejoj de fenestroj) aŭ la ornamaĵo (lakitaj aŭ ne, emajlitaj brikoj)

- la ligno por la aperturoj, markezoj kaj diversaj partoj de la tegmento (kurbaj apogiloj de la elstartegmento).

- la forĝita fero por bariloj, kradoj, protektaĵoj de pordoj, de fenestroj aŭ balkonoj (tordaĵoj, spiraloj, arabeskoj inspiritaj de la naturo)



- la plurkoloro de la ceramiko en panelo sur la fasado, en frisoj kaj en freskoj (supre la pordoj aŭ fenestroj aŭ de la farbaĵoj (freskoj) sur la fasado.


- la pentritaj vitroj de pordoj, fenestroj, impoŝtoj, lukoj kun ornamaĵoj karakterizaj de la Nova Arto..

- ardezoj kaj tegoloj por la tegmentoj.

Nova Arto en Nancio

Itinero n° 2

Promenado tra la kvartalo de Parko Sainte-Marie



En tiu pitoreska kvartalo, domoj kaj iliaj ĝardenetoj randas la stratojn, krom du larĝaj avenuoj, kiuj kondukas al Vogezoj.

La naturejo plivastiĝas ol la konstruaĵejo.

Ĉie estas videbla "la Nancia Skolo" : la muzeo, la nomoj de la artistoj "Victor Prouvé kaj "Emile Gallé", de la hortikulturisto "Victor Lemoine", de la arkitektoj "Emile André" kaj "César Pain".

Multaj konstruaĵoj montras la guston de la koloro kaj de la flora ornamaĵo.

1/Muzeo pri la nancia skolo 1911-1912

36-38 rue du Sergent Blandan



Situanta en la proprietaĵo de Eugène Corbin, akirita de la urbo cirkaŭ 1951-1952, la Muzeo de la Nancia Skolo estas arkitektura

ejo de la sama epoko, kiel la prezentataj ellaboraĵoj .

Malgraŭ la urbanizo de la kvartalo, la plej granda parto de la ĝardeno postrestas kaj ĝia rearanĝo en 1999 ebligis redoni la vegetalan ornamaĵon, kiel komence de la jarcento.

La kolektoj atestas la diversecon de la teknikoj (pri mebloj, artobjektoj, vitraĵoj, vitraloj, ledo, ceramiko, teksaĵo...) uzitaj de la artistoj de la Nancia Skolo kaj tiel, restituas la atmosferon de tiu epoko.

La manĝĉambro "Masson", ellaboraĵo de Eugène Vallin, estas prezentata preskaŭ tute.

Ankoraŭ aliaj ununuraj objektoj , tiaj la lito « Aube et crépuscule » (Tagiĝo kaj krepusko) kaj la tablo « Le Rhin » (La Rejno) de Emile Gallé, « la chambre à coucher de la Villa Majorelle » (la dormĉambro de la Vilao Maĵorel) kaj la piano « La mort du cygne » (la morto de la cigno) de Louis Majorelle estas videblaj.

Bela vitrartaĵaro de Emile Gallé, ilustras la teknikajn prodaĵojn kaj la naturalan inspiron de tiu arta movado.

2/Vilao "Lejeune" 1902-1903

30 rue du Sergent Blandan

Arkitekto : Emile André

Konstruita por Armand Lejeune, pentristo, tiu vilao enhavis hejmon, atelieron (nun malaperinta) kaj loĝejon por domgardisto.

La formo de la tegmento estas inspirita de la normanda arkitekturo.

Ĉe la domo, la garaĝo estis la unua, kiu havis en Nancio teraso-tegmenton.



3/Domo "Biet" 1907

41 rue Pasteur

Arkitektoj : Georges Biet kaj Eugène Vallin



Konstruita por Eugène Biet, vojaĝa komizo, la domo montras malsimetrian arkadon ĉirkaŭ la pordego kaj vegetalan ornamaĵon (helianto)


4/Domo "Renaudin" aŭ Vilao "Ambiel"

1902

49-51 rue Pasteur

Arkitekto : Lucien Bentz

En 1902, Georges AMBIEL, komisiis al la arkitekto Lucien BENTZ por konstrui domon apud la parko Sainte-Marie, sed li mortis antaŭ la fino de la konstruado.



Lia vidvino vendis la domon en 1906 al la pentristo Alfred RENAUDIN (1866-1944) kiu uzis ĝin kiel nancia pasloĝo.

La skulpta ornamaĵo estas farita de Auguste VAUTRIN (1868-1921).

La pentrita ornamaĵo de la ŝtuparŝakto malaperis kaj la vitralejoj de Jacques Grüber estis detruitaj.

5/Parko Sainte-Marie

En 1620, Jezuitoj instaligis sur la lokon kaj nomis ĝin Sankta Maria.

En 1808, la bieno fariĝis privata plezurĝardeno . Tiuepoke estis plantitaj la plejmulto da arboj. Rimarkindaj arboj: plorsekojoj, tulipujoj, cedroj, kverkoj.

En 1904, la municipo aĉetis la bienon por fari publikan ĝardenon en tiu novkonstruita kvartalo.



En 1909, tiu-ĉi akceptis grandan internacian ekspozicion, kiu alvenigis pli ol du milionoj da vizitantoj.

La lasta atestanto de tiu ekspozicio estas la alzaca domo Tiu aŭtenta alzaca domo devena de Zutzendorf (67) estis donaco.

Fortika bazo el tajlita ŝtono (voĝeza grejso) kaj la skulptitaj pordegofostoj atestas riĉan loĝejon. Sur la masonita teretaĝo, staras etaĝo konstruita el ligno. Sub la deklivitega tegmento el tegoloj, estas vastaj grenejoj.

La gablo enhavas du etaĝojn da galerioj kun pilastroj el kverkligno.

1798 estas la dato enskribita sur la pordo.